

N. N. 65,

Antonio-kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Ho Antonio, lumo de l' graco,
 Ho Antonio, petu por ni!
 Gvidas vi nin tra malluma spaco.
 Ho Antonio, petegu por ni!
 Estas la mondon vi ja superinta,
 Dion en la dezerto trovinta.
 Ho Antonio, petu por ni,
 Granda sanktulo, petegu por ni!

Forta helpanto de la mizeruloj,
 Ho Antonio, petu por ni!
 Helpu al ni, ni kompatinduloj,
 Ho Antonio, petegu por ni.
 Ŝirmu nin kontraŭ malsan' kaj danĝero,
 Por ke ni estu sekuraj sur Tero!
 Ho Antonio, petu por ni,
 Granda sanktulo, petegu por ni!

Kiel protektas vin viaj anĝeloj,
 Ho Antonio, petu por ni,
 Helpu nin vi en ĉiuj kvereloj.
 Ho Antonio, petegu por ni!
 Ke post kverel' kaj surtera malpaco
 Estu beataj ni pro Dia graco.
 Ho Antonio, petu por ni,
 Granda sanktulo, petegu por ni!

...

*Traduko de la Germana poemo "Antoniuslied" de N. N. 65 en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-896-1783 (2013-06-04 15:19:39)

Vidu ankaŭ la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Antonio_de_Padovo. Siehe auch die Internetseite des Ortsteiles Benteler: [http://de.wikipedia.org/wiki/Benteler_\(Langenberg\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Benteler_(Langenberg)). Dort ist auch die Kirche St. Antonius abgebildet.